# DIA REGNO

DIA REGNO

ISSN 0167-9554


• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 6 (921) • 2016 •



Aŭdu! Kantas anĝelĥor':
"Nun naskiĝas la Sinjor'!
Pro kompat' pekulojn Di'
repacigas nun kun Si!"
Homoj tra la tuta tero
resonigu tra l' etero
l' anĝelkanton pri la ven'
de la Beb' en Betlehem'!

ADORU 205

Bela sed nerealisma bildo. Jesuo verŝajne ne interfingrigis siajn manojn en Getsemano.
Legu pri la temo sur paĝo 138.



**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
🖂 Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +(0)420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
🖂 Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
🖂 Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Amo kaj la amo de Dio | 123 |
| Plugu al vi pluotaĵon | 125 |
| Prediko dum UK en Nitra 2016 | 128 |
| Por la unueco de la homaro | 131 |
| Monero ĵetita | 133 |
| La Rozo de Lutero | 136 |
| Rilate al la kongresa raporto | 137 |
| Preĝo kun interfingritaj manoj | 138 |
| Kongresa partoprenlisto - unua | 139 |
| Membriĝo ĉe KELI 2017 | 140 |
| Informetoj | 142 |
| Nekrologoj | 143 |
| Venu, Jesu' ni atendas vin | 144 |

## Redaktoraj vortoj

"La vortoj de Jesuo estas aktualaj ankaŭ nun." Tiel skribis József Farkas en sia prediko en Jyväskylä. Kvankam la mondo multe ŝanĝis dum la pasintaj du jarmiloj, la homaro kaj ĝiaj problemoj/bezonoj restas la samaj. Trafoliumante la oldajn Diajn Regnojn, mi trovis prelegojn pri la unueco de la homaro. Oni prelegis 1966 en la KELI-kongreso kaj okazis samtempe kiam la Konsilantaro de Eklezioj (WCC) pritraktis la temon "Eklezio kaj Socio". En 2006 WCC konstatis ke la eklezia partopreno en debatoj pri sociaj kaj ekonomiaj aferoj restas same gravaj kaj necesaj en la 21a jarcento kiel ĝi estis en 1966. Ŝajne la homaro nenion lernis. Mi timas ke la agado de la eklezioj restas je debatoj kaj nefarado. Ĉu ni, homoj – ne institucioj – povas ion lerni de la vortoj de Jesuo? Ĉu ni povas komenci agi por la unueco de la homaro? Ĉu ni povas komenci vidi nian kunvojaĝanton kaj ekami nian proksimulon? Ĉu ni povas fari diferencon?

# Amo kaj la amo de Dio

## Prediko dum la KELI-kongreso en Jyväskylä 1988

József FARKAS, hungara kalvinana pastoro (1914-1999)



Karaj gefratoj! Mi ĝojas saluti vin en la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu estas la sama hodiaŭ kaj eterne, en Finnlando kaj en Hungarujo kaj en la tuta mondo. Ankaŭ nun ni estas kune en lia nomo. Li estas ĉi tie kaj ankaŭ alparolas nin.

Mi legas nun el la Evangelio laŭ Sankta Johano, la 34-an kaj 35-an versiklojn el la 13a ĉapitro:


> "*Novan ordonon mi donas al vi, ankaŭ vi amu unu la alian; kiel mi amis vin, tiel vi ankaŭ amu unu la alian. Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia.*"

La vortoj de Jesuo estas aktualaj ankaŭ nun. Mi pensas, ke la legitaj Vortoj estas nuntempe speciale aktualaj. La amo estas la vorto, pri kiu ni ofte parolas en kristanaj rondoj, sed ĝuste tial ĝi multe perdis sian valoron. Mi petas vin, ke ni kune atente enprofundiĝu en ĉi tiun biblian tekston por pli bone kompreni ĝin. Mi portis al vi tri pensojn pri ĉi tiu teksto kaj tiujn mi volas pli detale klarigi antaŭ vi.

Unue: ĉi tiu vorto prijuĝas nian amon. Ni asertas, ke ni amas multajn, kaj ni pensas, ke ni faras tion bone. Se tio estus tiel, ni ne bezonus novan ordonon. Kio estas malbona tiam en nia amo? Ekzemple: nia amo estas egoista. Ni amas tiujn, kiuj nin amas. Ni amas tiel, ke ni estu amataj. Plue: nia amo estas agresiva. Kun la preteksto, ke ni amas, ni fariĝas postulemaj. Ofte tiel amas geedzoj unu la alian, gepatroj siajn infanojn, geamantoj unu la alian. Fine: nia amo ne estas fidinda, daŭra. Tute ne simila al tio, kion ni legas en la 13a ĉapitro en la unua epistolo de Paŭlo al la korintanoj (4-8/a):

> "*Amo longe suferas, kaj bonfaras; amo ne envias; amo ne fanfaronas, ne ŝveligas sin, ne kondutas nedece, ne celas por si mem, ne koleriĝas, ne pripensas malbonon, ne ĝojas pri la maljusteco, sed kunĝojas kun vereco; ĉion toleras, ĉion kredas, ĉion esperas, ĉion eltenas. Amo neniam pereas; ...*"

Ĉu vi akceptas, karaj gefratoj, ke la


Karaj Gefratoj! (1)
Mi ĝojas saluti vin en la nomo de mia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu estas la sama hodiaŭ kaj eterne, en Finlando kaj en Hungarujo kaj en la tuta mondo. Ankaŭ nun mi estas kune en lia nomo. Li estas ĉi tie kaj ankaŭ alparolas nin. Mi legas nun el la evangelio laŭ Sankta Johano la tridek kvaran kaj tridek kvinan versojn el la [illegible] ĉapitro: „.....". La vortoj de Jesuo estas aktualaj ankaŭ nun. Mi pensas, ke la [illegible] vortoj estas nuntempe speciale aktualaj. La amo-

Parto de la manuskripto por la prediko

nova ordono de Jesuo Kristo prijuĝas nian ĝisnunan amon?

Due: en iu tre saĝa libro mi legis iun tre belan frazon: "*Dio fariĝis pli riĉa, kiam li kreis la mondon, ĉar de tiam li havis ion kaj iujn por ami. Sed li fariĝis pli malriĉa, kiam li sendis Jesuon al la mondo, ĉar de tiam multaj rifuzis lian amon.*"

Longe oni tiel instruis, ke Dio estas ofendita kaj kolera, ĉar la homoj rifuzas lian amon. De kiam ni komencas kompreni la misteron de la kruco de Kristo, ni komencas malkovri, ke Dio ne koleras, sed suferas pro la rifuzita amo. La Patro kune suferis kun sia Filo, kiam li mortis sur la kruco.

Ĉi tiu evento estas karakteriza pri ĉiu vera amo. Tiomgrade, ke se iu tiel amas, ke en sia amo ne estas sufero, tio estas iom suspektinda. Poetoj tiom profunde komprenis tiun fakton, ke ili rekte asertis, ke amo kaj morto estas gefratoj. Nenie en la mondo troviĝas amo sen sufero. Ĉu vi jam spertis tion? Ĉu vi komprenas tion? Mi estas certa, ke ankaŭ nun en ĉi tiu komunumo troviĝas iu, kiu ĝuste nun multe suferas pro sia rifuzita amo. Se vere estas tiel, mi diras al vi, kara frato aŭ fratino, ke ankaŭ Dio suferas pro sia rifuzita amo.

Ĝenerale neniu homo ŝatas suferi. Eĉ kiam komenciĝas suferoj ie, oni tuj klopodas rifuĝi de tie. Ĉe tiu punkto pleje diferencas nia amo de la amo de Kristo, kiel ni legas tion en la epistolo al la filipianoj (2:5-8):

> "*Tiu sama spirito estu en vi, kiu estis ankaŭ en Kristo Jesuo, kiu, estante en la formo de Dio, ne rigardis kiel ŝatindaĵon la egalecon kun Dio, sed sin malplenigis, alprenante la formon de sklavo, fariĝante laŭ la bildo de homoj; kaj troviĝante laŭfigure kiel homo, li sin humiligis kaj fariĝis obeema ĝis morto, eĉ ĝis la morto per kruco.*"

Kaj ĉi tiu estas la punkto, kie ni komprenas, ke vere estis necese, ke li denove konceptu por ni la esencon de la Dia amo kaj tio estis ne nur koncepto, sed ankaŭ efektiviĝo sur la kruco.

Trie: Do, Jesuo parolas al ni pri la amo, al ni, kiuj rifuĝas de la amo, ĉar la vera amo ne ekzistas sen sufero. Ĉar Li

multe amas nin, Li ne permesas, ke ni haltu sur pli malalta ŝtupo de la amo. Li donas novan ordonon, kiun Li realigas per sia vivo kaj morto, kaj per Sia Sankta Spirito Li kapabligas ankaŭ nin, akcepti ĉi tiun amon. La maniero, kiel lerni ĉi tiun amon, estas: rigardi al la kruco, serĉi la vivan kontakton kun la reviviĝanta kaj vivanta Jesuo Kristo.

Tiam ni povas diri, ke ni komprenis ĉi tiun novan ordonon de Jesuo, se en nia koro naskiĝas la deziro kaj la decido, ke ni devas ĉion komenci denove.

Se vere fariĝos nova ordono, tio, pri kio ni ĝis nun pensis, ke ni jam tion bone scias, tiam ni ankaŭ ricevos novan forton por tiu komenco.

Fine ne forgesu tiun grandan evangelion, ke "*ni amas, ĉar Li unue nin amis*". Kaj Li amas nin ankaŭ tiam, se ni ne scipovas bone ami. Kaj Li amas nin fidele, ĝis ankaŭ ni ellernas tiel ami, kiel Li amas nin. Mi deziras al vi, karaj gefratoj, ĉi tie en Finnlando tion, kion ankaŭ ni komprenis kaj lernadas en Hungario: tiel ami unu la alian, kiel Jesuo Kristo amas nin. —

Amen

# Plugu al vi plugotaĵon ...

## Artikoloj, studoj kaj predikoj en libroformo. de Jozefo Farkas, hungara reformita pastoro

Éva FARKAS-TATÁR, HU

Kiam en 1986 Jozefo Farkas kompilis la materialon de ĉi tiu libro, li jam de sesdek jaroj predikis, instruis en la Hungara Reformita Eklezio. Li studis kiel teologia studento en Halle an der Saale kaj en Ĝenevo. Li servis unue kiel junulara misia pastoro en la tuta lando. De 1948 li fariĝis paroĥestro de malgranda novfondita komunumo en malnova kvartalo, en la mezo de Budapeŝto. Tie li restis, pensiiĝis kaj servis plu aktive ĝis la morto, la 25-an de decembro 1999, kiam dek minutojn antaŭ la diservo subite kaj silente haltis lia laciĝinta koro. Li ricevis 85 riĉe benitajn jarojn.

Tie li travivis kun siaj paroĥanoj la malfacilajn tempojn de ideologiaj atakoj kaj ankaŭ la premon de malriĉeco. Havante kvin malgrandajn infanojn li renkontis ĉiujn problemojn, kiujn devis travivi ĉiuj aliaj homoj en tiu tempo. Li konscie serĉis kaj petis la Vorton de Dio, sentante la respondecon por la ŝafoj, al kiuj li devis ĉerpi el pura fonto, kaj konduki ilin al la Ĉefpastoro.

Ĉar la Vero estis por li ĉiam la plej grava, kelkfoje li fariĝis malakceptata



Éva Farkas dum la kongreso en Strazne 2006

persono dum la diversaj ŝanĝoj politikaj kaj ekleziaj. Sed en la komunumo kolektiĝis ĉirkaŭ li homoj, kiuj ĝuste tion serĉis, lokon, kie ili rajtas dubi, meti demandosignojn, tie, kie la instituсia disciplino aliloke ne permesas tion.

Dum preskaŭ kvardek jaroj – kun kelkaj interrompoj – ĉiusemajne aperis de li glosoj en la eklezia gazeto, tre popularaj pro tio, ĉar li aŭdacis skribi ankaŭ pri tute aktualaj temoj, sed ĉiu sentis, ke li serioze ekzamenis tiujn temojn ĉe la lumo de la Sankta Spirito. Kompreneble, ne ĉiuj samopiniis, sed li neniam volis persvadi iun ajn, nur sincere diri tion, kion li akceptis kiel Dian Mesaĝon.

Sub la egido de "libera praktikado de religia kulto" aperis ekleziaj eldonaĵoj regule eĉ en la plej malfacilaj jaroj, sed por la artikoloj kaj predikoj de Jozefo Farkas neniam estis "papero". De la naŭdekaj jaroj kiel propraj eldonaĵoj aperis unue liaj prediko-serioj en malgrandaj kajeroj. Ĉi tiu libro PLUGU AL VI PLUGOTAĴON (Hoŝea 10,12 – en kelkaj tradukoj "novan kampon") – havas ankaŭ subtitolon, "alternativa teologio" – kiu kelkajn homojn ŝokis sed pli multajn instigis trastudi ĝin.

Li neniam arogis al si, ke tio estas la unika kaj lasta Vero kiun li malkovris, sed humile kaj konscie atestis pri tio, kiel li ricevis Lumon kaj Mesaĝon el la graco de la Sinjoro. Sciante pri tio, ke multaj pensemaj homoj stumblis jam pro rigidaj predikoj, li sentis la respondecon oferti helpon por "vero-serĉantoj".

Tiu ĉi libro rapide elĉerpiĝis kaj jam la duan fojon estis eldonita, ĉar vere multaj legis ĝin kun granda ĝojo. Ĝi aperis ankaŭ en angla lingvo. Por prezenti iom el ĝia direndo mi tradukis tiun resumon, kiun Jozefo Farkas mem metis al la fino de la libro.

# Resumo

## PLUGU AL VI PLUGOTAĴON – ALTERNATIVA TEOLOGIO

La plej gravaj tezoj el la libro:

1. Dio ne estas tia, kiel ni lernis en la religio-instruado aŭ en la predikoj. Estas promesite al ni, ke Dio mem instruos nin. (Joh. 6,45; l.Tes. 4,9) "ĉiuj estos

instruitaj de Dio”, “vi mem estas instruitaj de Dio”.
Dio estas tia, kia estis Jesuo, la Nazaretano.

2. La Biblio ne estas kolektaĵo kaj trovejo de dogmoj, sed fajrejo de la Sankta Spirito. La vorto (litero) en si mem ne estas Vorto de Dio. La vorto, ekbruligita de la Sankta Spirito fariĝas Vorto.

3. Jesuo ne pretan konstruaĵon, sistemigitan teologion, dogmaron postlasis por ni, sed konstruelementojn, Vortojn, ne enigitajn en sistemon, el kiuj ni mem devas konstruadi. Ekzemple la teologio de apostolo Paŭlo estas iu ebla konstruaĵo surbaze de Lia morto kaj resurekto, sed apenaŭ surbaze de Liaj instruoj! El la samaj konstruelementoj, ĉefe el la kvar evangelioj, eblas konstrui ankaŭ alispecan konstruaĵon.

4. La dogmoj ne helpas, sed malhelpas la personan/individuan, liberan, viglan spiritan vivon. Ĉi tiu libro ne estas “sistema teologio”, nur tia persona konfeso, en kiu estas enkalkulita ankaŭ la eblo de eraro. Sed mi atestas pri tiu granda evangelio, ke nenion damaĝas la dogmatikaj eraroj se la Graco purigis nian koron.

5. Plenan homan vivon oni povas vivi nur per la helpo de superhomaj fortoj.


6. La Eklezio estas ligita al la Sankta Spirito, sed la Sankta Spirito ne estas ligita al la Eklezio.

7. La sanan spiritan vivon ebligas la atmosfero de libereco. Dio ekstreme estimas la liberecon de la homo. Ankaŭ ni devas estimi la liberecon de la alia homo; (animzorgado, evangelizado...).

8. Same kiel ne ekzistas saviĝo sen ekstera helpo, tiel ne ekzistas saviĝo ankaŭ sen la mobilizado de niaj propraj – ofte profunde kaŝitaj – internaj energioj.

9. Ekzistas heredita peko, sed ekzistas ankaŭ heredita boneco.

10. Saviĝo estas: la Spirito de Jesuo okupas kaj plenigas min kaj potenciĝas en mi.



La hungara frontpaĝo de la priskribita libro.

# Prediko dum UK en Nitra 2016

## La ekumena diservo okazis la 24-an de julio

Philippe COUSSON, FR

Karaj gefratoj en Kristo, karaj gesamideanoj, por hodiaŭ, la listo de tekstoj kondukas nin al la Evangelio laŭ Luko. Pasintan semajnon, ni aŭdis pri Marta kaj Maria, pri konfido anstataŭ zorgo, pri aŭskultado anstataŭ disstreĉo pro aktivismo.

Aŭskultado kaj konfido kondukas al preĝo – necesas por preĝo. Tial la unua parto de nia teksto estas la Luka versio de la Preĝo de la Sinjoro, la Patro Nia. Ni kutime uzas la alian version, tiun de Mateo, iom pli longa.

La posta peco el nia hodiaŭa teksto troviĝas nur ĉe Luko. Temas pri mallonga parabolo. Ni pli precize meditos ĝin. La lasta peco troviĝas ankaŭ ĉe Mateo, sed en alia loko en la sinsekvo de la evangelio.

Povas esti interese serĉi eblan kialon pro tiuj malsamecoj. Estas ankaŭ interese rigardi kio troviĝas inter la disigitaj partoj. Hodiaŭ mi limigos min esence al la meza peco, tiu propra de Luko.

Tiu triopo da pecoj havas kiel unuan temon: la preĝo. Ili estas respondo de Jesuo al la demando de la disĉiploj: "*Instruu nin preĝi*". Jen do rapida leciono pri la preĝo.

Vi povos konstati, ke la respondo de Jesuo ne donas metodon, nek ekzercojn por bone preĝi. Ne interesas Jesuon ke ni preĝu laŭ la bona maniero, sed ke ni

---

Foje li estis ie preĝanta. Kiam li ĉesis, unu el liaj lernantoj petis lin: Sinjoro, instruu nin preĝi, same kiel ankaŭ Johano instruis siajn lernantojn. Li diris al ili: Kiam vi preĝas, diru:

*Patro, sanktiĝu via nomo, venu via Regno; nian bezonatan panon donu al ni ĉiutage kaj pardonu al ni niajn pekojn ĉar ni ja pardonas al ĉiu nia ŝuldanto kaj ne konduku nin en elprovon.*

Kaj li diris al ili: Supozu, ke iu el vi havas amikon kaj noktomeze iras al li por peti: Amiko, pruntu al mi tri panojn, ĉar amiko mia alvenis al mi post longa vojaĝo kaj mi ne havas, kion antaŭmeti al li. Ĉu tiu ene respondus: Ne ĝenu min; la pordo jam ŝlosita, kaj miaj infanoj kaj mi jam estas enlite; mi ne povas ekstari por doni al vi? Ja ne: mi certigas vin: Se li ne ekstaras kaj donas ĝin ĉar li estas lia amiko, tiam do li leviĝas por doni, kion li bezonas, kaŭze de lia senhonta insistado. Ankaŭ mi diras al vi: Petu, kaj estos donite al vi, serĉu, kaj vi trovos, frapu, kaj estos malfermite al vi. Ĉar ĉiu petanto ricevas, kaj la serĉanto trovas, kaj al la frapanto estos malfermite. Se al unu el la patroj inter vi infano petos pri fiŝo, ĉu anstataŭ fiŝo li donos serpenton? Se li petos ovon, ĉu li donos al li skorpion? Se do vi, estante malbonaj, scias doni bonajn donaĵojn al viaj infanoj, kiom pli do la Patro ĉiela donos sanktan spiriton al tiuj, kiuj ĝin petas?

Luko 11: 1-13
laŭ la traduko de Gerrit Berveling

konsekvence vivu tiun preĝon en la ĉiutaga vivo.

La unua parto estas do modelo por preĝo. Estas tiu teksto konata de preskaŭ ni ĉiuj, sed laŭ la alia versio. La lastan parton de la leciono, oni povas resumi per ĝia komenca frazo : "*Petu kaj estos al vi donite*", tio estas ilustrita per diversaj trafaj bildoj.

Kaj en la meza parto troviĝas do mallonga parabolo. En ĉi tiu parabolo, oni renkontas tri rolulojn, unu el ili troviĝas inter la du aliaj, kaj Jesuo supozigas ke ĝuste tiu povas esti la disĉiplo, povas esti vi, povas esti ni, iu ajn el ni.

Do, tiu protagonisto havas du amikojn. Jes, du. Bone aŭskultu: "*kiu el vi havos amikon*" kaj pli poste "*amiko mia venis al mi"*. La supozo de Jesuo estas ke la disĉiploj – kaj ni inter ili – havas almenaŭ du amikojn. Kaj ke unu petas al vi, kaj vi petas al la alia.

Tamen estas stranga horo. Tiel malfrue alveni ĉe amiko, ŝajne ne-anoncite. Konsekvence, por akcepti lin, kion vi nepre devas fari ĉar temas pri amiko kiu alvenas post vojaĝo, verŝajne longa, vi devas nutri lin, sed vi ne havas sufiĉe.

Kaj, je tiu stranga horo, vi ne hezitas iri al la najbaro, ĉar estas amiko. Vi certe ne dubas pri tiu amiko, kiun vi efektive ĝenas.

En la komenco, eble malbone vekita, iom en la nebulo de haltita dormo, la dua amiko respondas, ke la horo ne estas deca, ke la tuta familio dormas. Tiam, vekita, ĝenata, ege ĝenata, tiu tamen leviĝas, ĉar ne plu dormas. Kaj eble eĉ ne konsciante pri kiu petis, pro la definitiva ĝeno, persista peto, tiu helpos al sia amiko. (En kelkaj landoj, eble li vokus la policon, aŭ pafus tra la pordo. Estas tiom da eblaj malbonuloj.)

La afero en tiu mallonga parabolo estas ke ĝi metas nin en ambaŭ pozicioj. Ni estas kaj la petatoj, kaj la petantoj. Ni ne forgesu tion.

Kvankam…

La vojaĝinto formale petis nenion. Estas la amiko, kiu estas devigata de la tiamaj sociaj reguloj akcepti, loĝigi kaj nutri lin. Kaj tion li intencas fari, komencis fari. Sed estis bezonata helpo.

Ĉu hodiaŭ ne plu validas ĉi tiu devigo pri akcepto, pri gastigo?

La dorminta amiko, kiu tiel tediĝis ke li helpis, ne nur helpis al sia amiko, sed ankaŭ al la vojaĝinto.

La pordo de lia domo *estis* fermita. Sed, fermi domon signifas ĉesigi amikecon, eĉ pli, ĉesigi homecon.

Tiu ĉi pordo *ne restis* fermita. En ĉi tiu rakonto, la helpo estis donita, la akcepto estis plenumita.

Mi nun diros kelkajn vortojn ankaŭ pri la tria parto de nia hodiaŭa teksto.

Ĝi enhavas modelon de respondo al preĝo, kaj tiu modelo estas Dio. Kaj en tiu komparo, Jesuo metas nin en la pozicion ĝuste de Dio, de la patro petita de la filo. Ĉu patro donas ŝtonon anstataŭ pano, ĉu serpenton anstataŭ fiŝo?

Same kiel Dio donas al la petantoj la Spiriton, same kiel vi donas bonaĵojn al viaj infanoj, panon kaj fiŝon, tiel la amiko helpas al la amiko kiu vojaĝis kaj

alvenis en nokta tempo, same la amiko helpis la amikon en tiu akceptado.

Tiu teksto havas ankaŭ ion por diri al ni hodiaŭ.

Multaj el niaj kunhomoj vivas nune en la nokto, nokto kun fajro kaj minaco, nokto el kiu ili volas eskapi. Ili esperas je nia homeco, je nia amikeco. Pluraj, eĉ multaj, sentante en si tiun kunhomecon, tiun amikecon, akceptas ilin. Kaj ili iras al aliaj amikoj, kaj meznokte frapadas persiste al aliaj pordoj por io por nutri la vojaĝinton, por akcepti lin, ŝin, ilin.

Ni ofte, regule, kaj plenfide preĝas al Dio. Ĉu ni konscias ke ankaŭ antaŭ ni estas homoj kiuj petas akcepton, helpon, gastigadon. Sin turni al Dio, kaj samtempe rifuzi sin turni al la kunhomoj, tio estas ega kontraŭdiro.

Tiam preĝi ne havas signifon. Paroli sen respondi estas sensencaĵo. En la preĝo *Patro Nia* ni preĝas ke ni pardonas al niaj ŝuldantoj. Sed ĉu ni mem ne ŝuldas al la aliaj? Ĉu resti kun fermitaj pordoj antaŭ la helpopeto permesas al ni trankvile preĝi la preĝon de la Sinjoro? Vere?

Ĉu ni donu panon aŭ ŝtonon? Ĉu ni ne ricevis ĉion de Dio?

"*Frapu kaj estos malfermite*". Kiam oni frapas ĉe nia pordo, ĉu ni malfermu ĝin? Ĉu ni malfermu nian koron? Aŭ ĉu ni obstine rifuzas? Kaj tiam kion diras la teksto? Ni volas dormi.

Kaj en la ĝardeno de la monto olivarba, Jesuo diris al siaj dormantaj disĉiploj. "*Kial vi dormas? Leviĝu kaj preĝu*". Jes leviĝo kaj preĝo samtempas. Ne eblas unu sen la alia.

Amen.


El *Preĝo por ĉiu Tago*
de Jelly Koopmans-Schotanus

**15. decembro**

Baptu nin, ho Patro, per la sankta spirito. Malplenigu nin, por ke ĝi ekloĝu en ni. Ĝi regu niajn agojn kaj niajn pensojn, niajn vortojn kaj laborojn.




Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 74).
Tiel Vi subtenos la agadon "Stichting Zienderogen" iniciata de J. Tuinder.

En Dia Regno antaŭ 50 jaroj

# Por la unueco de la homaro –

## *La intenco kaj programo de Dio*

Adolf BURKHARDT (1929-2004), DE

*Dum la KELI-kongreso en Debrecen en 1966, sub la titolo "Por la unueco de la homaro", prelegis Adolf Burkhardt, Éva Farkas, kaj profesoro R. Horsky. Ĉi-loke ni republikigas la resumon de la unua prelego kun la subtitolo "la intenco kaj programo de Dio". Ĝi unuan fojon estis publikigita en la novembra numero de Dia Regno en 1966.*

*Kiam ni nun festos la 500-jaran datrevenon de la komenco de la reformacio, estas bone pripensi la intencon de Dio. Ĉu plaĉas al Dio vidi nian diversecon kaj malfacilaĵojn kunlabori ene de la kristanismo? /red*

Unu mondo aŭ neniu – tiu slogano estas tre realisma. Pli kaj pli estiĝas unu mondo, interdependa multrilate. La homoj havas en siaj manoj la rimedojn por neniigi ĝin. Granda respondeco kuŝas sur nia generacio. Estas rimarkinde, ke ĝuste nun [en 1966 /red] kunsidas en Ĝenevo konferenco, kunvokita de la Ekumena Konsilantaro de Eklezioj por pritrakti la temon "Eklezio kaj Socio". Tie do oni sentas respondecon.

Sed ĉu Dio mem havas planon kaj intencon pri unu homaro? Starigante tiun demandon, ni ja, tute konscie, jam faris antaŭdecidon, kiu ne estas logike argumentebla. Ni faris antaŭdecidon en la fido. Ĉar ne plu estas sekreto la prijuĝo "Dio mortis". Granda parto de la homaro, ankaŭ en la ofte tiel nomata kristana okcidento, kredas ke la trono de Dio staras neokupita. Tiam oni ne demandos pri la intenco kaj programo de Dio.

Por ekkoni la intencon de Dio rilate al la unueco de la homaro, ni turnas nin al la Biblio. Efektive ĝi parolas pri unueco.

La homaro estas unu en la kreo: Dio kreis la homon. Li kreis la homaron. Ĝi estas unu (Agoj 17,26).

Sed la homaro estas unu ankaŭ en la ribelo kontraŭ la bona volo de Dio. Ĝi turnis sin kontraŭ sia kreinto (Rom 3,9-12). Tial ĝi estas unu sub la kolero de Dio.

Por la unueco de la homaro

*Unua prelego: La intenco kaj programo de Dio*

*(A. Burkhardt)*

Kaj la homaro estas unu sub la serĉanta kompatemo de Dio. Sub la kruco de Jesuo Kristo, la mondo estas amata. Dio celas la tutan mondon, la tutan homaron. “Dio tiel amis la MONDON, ke Li donis Sian solenaskitan Filon...” (Joh 3,16).

Tion Dio volas. Tio estas lia programo. Li ne volas, ke la kolero restu minace super la homaro. Lia intenco estas por paco kaj savo. La homaro estu unu sub la graco, libere akceptita, sen trudo. La tre serioza fono tamen estas, ke la homo povas fari sian decidon kontraŭ tiu oferto, do eliĝi el la unueco de la graco.

Kian modelon de la unueco laŭ la volo de Dio prezentas la kristanaro antaŭ la mondo? La skandalo de la dividiteco estas publika. En unu usona malgranda urbo mi trovis, ĉe la sama vojkruciĝo, kvar protestantajn, evangeliajn preĝejojn, en ĉiu angulo unu; ili ne rilatis unu kun la aliaj. Plej evidenta estas la skandalo, kiam ni ne povas komune partopreni en tio kio volas plej forte kunligi nin – la Sankta Manĝo. Ĉu ni devos atendi, ĝis ni havos la saman komprenon pri ĉiuj detaloj?

Prisilenti la diverseton certe ne helpas. Tio ne estus unueco. Sed ĉu la Biblio taŭgas kiel bazo de unueco? Ĉu ne ĉiu kristana sekto prenas siajn argumentojn ĝuste el ĝi?

La pli detala esplorado de la Biblio dum la pasintaj du jarcentoj klare montris, ke ĝi estas multe pli kolora, varia, riĉa ol oni longan tempon pensis. Eĉ hodiaŭ multaj ne volas agnoski la internajn tensiojn en la Biblio, timante, ke tio rompos ĝian unuecon. Kiam oni en la frua eklezio kompilis la norman Biblion, la kanonon, ĉu oni ne konsciis pri la diferencoj kaj la diverseco inter la unuopaj apostoloj kaj disĉiploj? La fakto, ke apud Marko povas stari Johano, apud Paŭlo Jakobo, en la sama Biblio, estu lum-dona: La malsamaj akcentoj de la diversaj evangeliistoj, por nomi ekzemplon, nenion forprenis de la komuna baza unueco en la konfeso “Jesuo Kristo estas la Sinjoro”. La karakteroj de la disĉiploj estis tre malsamaj inter si. Jesuo ne ŝanĝis la karakterojn, li ne unuformigis.

Unueco ne egalas al unuformeco kaj monotoneco. Tio ja estus mortige teda kaj enuiga. La Biblio montras grandan variecon, sed tian, kiu ne rompas la unuecon – sur komuna bazo, sub la komuna kruco de Jesuo Kristo.

Ĉu ni, per nia bona volo, povas atingi, kion ni perdis – tian unuecon en vario? Per nia bona volo, certe ne. Nur la venko de Jesuo Kristo donas al ni kaj eblecon kaj esperon. Sub lia kruco, do sub la pardono, ni povas labori kaj devas labori por pliproksimiĝi al tiu Lia lasta volo, ke ili ĉiuj estu unu. Nun ni devas trovi la vojon, kaj ni lernu unu de la alia. Aŭ ni baras kaj bremsas la intencon kaj programon de Dio, aŭ ni plenumas ĝin.

Al la nuna mondo ni ŝuldas komunan ateston. Jam estas tempo, ke ĉesu la pia egoismo, kiu celas nur la propran saviĝon kaj lasas la alian droni. La taskoj, kiujn frontas la nuna mondo, estas grandegaj. Ili estas ankaŭ la taskoj de la kristanaro; ĉar Dio ne kreis la mondon, por ke ĝi pereu, sed por ke ĝi havu veran vivon.

# Monero ĵetita

Julia SIGMOND, IT/RO

Dum mia vivo ofte okazis, ke ni ĵetis moneron enaeren, kiam ni ne sukcesis facile kaj unuanime decidi pri io. Precipe, kiam ni estis infanoj kaj ni ne povis (aŭ ne volis) decidi, kiu komencu, kiu estu la unua en iu ludo.

Kiam mi legis la unuan fojon la novelon DEK-LIRA MONERETO de Sen Rodin, sincere konfesante, mi tre konsterniĝis. Ĉe la komenco tutsimple mi ne povis kompreni! Ja ne temis pri iu ludo! Sed pri serioza vivoŝanĝo!

Junaj geedzoj estas invititaj al alia kontinento. Nome, ili devintus forlasi Eŭropon kaj komenci tute novan vivon en Aŭstralio. La decido estas neebla, ĉar la *alternativoj prezentiĝis egalpezaj*. Ja tiutempe (1961) la malvarma milito furiozis, kaj ĉiuj timis, ke post du mondmilitoj la mondo pereos en atommilito!

Aŭstralio estas ege malproksime de ĉi tiuj problemoj. Tie neniu devas timi, eĉ pripensi iun ajn militon. Sed forlasi Eŭropon, ĉu? Kaj krom la amikaro la parencaron, precipe la du patrinojn (ambaŭ vidvinoj), ĉu?

Jes, la decido estis neebla! Iel tamen oni devis decidi!

Kaj la monerĵeto devis decidi! La hazardo! –- anstataŭ la du gejunuloj.

Nun mi jam hontas tiun mian konsterniĝon! Estas bezonata iom da empatio por kapabli ekkompreni similajn ekstremajn okazojn.

Eble ekzistas homoj, kiuj eĉ longan vivon finvivas, sen havi okazojn pri neebleco, nekapablo decidi. Tamen, la plimulto de la homaro certe troviĝis almenaŭ unufoje en la vivo, kiam la propra decido ŝanĝas esence ĉion.

Se ni demandas geaĝulojn, kion ili estus farintaj alie en sia vivo, 99 % scias precize, kiam kaj kion ili devintus fari alimaniere. Se ili estas sinceraj kaj honestaj, ili konfesas tiun dolorigan punkton, kiam ili ne kuraĝis diri: ne! Kaj ili ne aŭdacis ĵeti aeren moneron, ĉar ili ne havis la esperon, ke eble la hazardo helpos ilin! Aŭ ili timis, ke oni devus obei la hazardan rezulton!

Kiam ankaŭ en mia vivo aperis la situacio, kiam – ne kapablante decidi – mi bezonis la faman moneron, tiam mi ekkomprenis la signifon de la neebleco de la decido. Malaperis mia konsterniĝo. Jam mi ne estis indignita, nur trista, ĉar mi jam estis plenkreskulo devigata decidi. Mian tutan animon plenigis la sankta envio pri mia propra infaneco, kiam ne mi devis decidi koncerne pri io ajn, sed miaj karaj kaj amegataj gepatroj! Kiel stultaj ni estas infanaĝe, dezirante iĝi plenkreskuloj, ne sciante kaj ne konsciante nian tiaman feliĉon.

Plenkreske mi kapablis travivi kaj trasenti tiujn terure malfacilajn, sendormajn noktojn de tiuj du gejunuloj, kiuj ne povis decidi kaj estis devigitaj uzi tiun praan metodon, aeren ĵetante moneron, atenti la decidon de la hazarda sorto: ĉu fronto aŭ dorso?

Kaj poste alvenos la momento, kiam la fiera homo humile pensas: jam nur Vi decidas, Sinjoro! ☙

# La Rozo de Lutero

Kompilis Bengt Olof Åradsson, SE

La lutera sigelo aŭ la Rozo de Lutero estas vaste rekonata simbolo por la luteranismo. Estas la sigelo, kiu estis desegnita por Marteno Lutero por lia letera verkado kiam li restis en la fortikaĵo de Coburg dum la kunveno en Augsburg en 1530. Lutero uzis la sigelon por rajtigi sian korespondadon. Verŝajne la tiama princo Johann Friedrich I. von Sachsen transdonis al Lutero sigelan ringon kun tiu motivo, kiam la princo vizitis Luteron en la fortikaĵo.

Laŭ korespondado inter L. Spengler kaj Lutero, Spengler sendis al Lutero desegnaĵon de tiu sigelo kaj responde Lutero klarigis ke li vidas ĝin kiel esprimo de sia teologio kaj fido (vidu apude).

La bazan floran modelon por la sigelo eblas trovi parte en la monaĥejo en Erfurt kie Lutero vivis inter 1505 kaj 1520. En 1519 estis publikigita prelego de Lutero kun lignogravuraĵo montrante Luteron kun rozo. De post tiam la simpla rozo estis la signo de Lutero. Sur la doktora ringo de Lutero troviĝis ŝildo montrante la koron, simbolo de la Sankta Spirito.

La Rozo de Lutero estas uzata en heraldiko de pluraj lokoj en Germanio kaj en Hungario. Ĝi estas ankaŭ uzata mondvaste por montri evangeliajn-luteranajn ekleziojn kaj instituciojn.

ↂ



Friedenskirche en Leipzig Gohlis.

Lipedia/Vikipedio



Dom St. Maria Tallinn, Estonio

Zairon/Wikimedia Commons



Rozo de Lutero sur luterana preĝejo en Csákvár, Hungario



Enirejo al luterana preĝejo en Tbilisi.
Traubenberger /WikimediaComons

# La klarigo de Lutero pri la signifo de la sigelo

Laŭ korespondado inter L. Spengler kaj Lutero.
Traduko el WA, Luthers Briefwechsel, 5. Band, S. 444f (Nr. 1628).

“Mi respondas plej afable kaj diras mian originalan penson kaj kialon kial mia sigelo estas simbolo de mia teologio. La unua devus esti nigra kruco en koro, kiu retenas sian naturan koloron, tiel ke ĝi rememorigas min ke la kredo je la Krucumito savas nin “ĉar per la koro la homo kredas ĝis justeco,” (Rom 10:10). Kvankam estas nigra kruco, kiu mortigas kaj kiu devus kaŭzi doloron, ĝi lasas la koron resti en sia natura koloro, ĝi ne detruas la naturon, tio estas, ĝi ne mortigas sed tenas vivanta. “La virtulo vivos per sia fideleco” (Rom 1:17) sed per la fido al la krucumita. Tia koro devus stari en la mezo de blanka rozo, por montri ke fido donas ĝojon, konsolon kaj pacon. ... Tial la rozo devus esti blanka kaj ne ruĝa, ĉar blanka estas la koloro de la spiritoj kaj la anĝeloj. Tia rozo staru en ĉielblua kampo, simbolante ke tia ĝojo en spirito kaj fido estas komenco de la ĉiela estonta ĝojo, kiu komenciĝis jam, sed tenata en espero, ankoraŭ ne malkaŝita. Kaj ĉirkaŭ tiu kampo estas ora ringo, kiu simbolas, ke tia feliĉo en Ĉielo daŭras ĉiam kaj ne havas finon. Tia feliĉo estas delikata, preter ĉia ĝojo kaj havaĵoj, kiel oro estas la plej alta, valora kaj bona metalo.”



Rozo de Lutero laŭ desegno de Daniel Csörföly (Budapest, HU) / Wikimedia Commons

## 50-Euro-Goldmünze “Lutherrose“

Notinde: La Federacia Registaro en Germanio decidis eldoni 50-EUR oran moneron “Lutherrose” pro la kaŭzo ke la tezoj de Lutero enkondukis la reformacion kiu grave influis mondhistorion en politiko, religio, kulturo kaj socio. La monero estos eldonita en la unua duono de 2017.




www.bundesfinanzministerium.de/Content/DE/Pressemitteilungen/Briefmarken/2016/08/2016-08-31-PM22.html

Martin-Luther-Kirche, Heilbronn, Germanio




**Maldekstre**: la 1.a de la 94 tezoj de Martin Luther: “Komencu nove kun Dio” (“Fangt neu an mit Gott”).
**Dekstre**: malantaŭ la arbo, vi vidas sube la Luther-rozon.

## *Kara redaktoro,*

rilate al la Luther-rozo, sur la foto vi vidas mian Luther-preĝejon, jam ornamita per paneloj.

En la nokto la turo estas lumigita alterne kun la 4 koloroj de insigno. La instalaĵo por la lumigiloj estas videbla sur la turo sube.

Salutas amike
Siegfried

---

**Belan kristnaskan feston &**
**Sukcesan novan jaron**

al ĉiu leganto de Dia Regno deziras
la sekretario & distribuanto kaj la redaktoro

Pavel POLNICKÝ & Bengt Olof ÅRADSSON

# Rilate al la raporto pri la kongreso.

Karaj Bengt Olof kaj Agnes,

Vin ambaŭ mi volas ege danki pro viaj raporto kaj fotoj pri la KELI kongreso 2016 en Bratislava. Bedaŭrinde mi ne povis ĉeesti, sed per la raporto de Agnes en Dia Regno akompanata de multaj fotoj kaj per la multegaj alie vidataj fotoj mi sentis min preskaŭ partoprenanto. Komplimenton pro la tuta enhavo de Dia regno n-ro 4/2016.

Ĝi estas tre leginda! Sur la fotoj mi vidis vin ambaŭ kaj la filon. Kiel granda li jam estas!!! Mi konstatis, ke eĉ Eva partoprenis, kvankam ŝi estas pli aĝa ol mi. Feliĉe mi fartas relative bone, tamen sola vojaĝi tra Eŭropo kaj forlasi mian domon por pli ol semajno, mi ne plu volas kaj povas. Tamen mi estas ankoraŭ aktiva rilate al Esperanto. Ĝis la somerferioj mi instruis hejme kvar kursanojn el kiuj unu lastprintempe iĝis eĉ estrarano de Esperanto Nederland.

Nun komencis studi ĉe mi juna sinjoro el iu provinca vilaĝo. Espereble sekvos pli. Venontan jaŭdon ni  havos malfermitan vesperon por varbi eventualajn novajn kursanojn.

Lastsabaton mi partoprenis studotagon de NGGE (Nederlanda sekcio de ILEI) en Roterdamo. Ĉeestis naŭ personoj, tri el Nederlando kaj usonano, ĉino, rumanino, franco, tajlandino, italo kaj slovako. Tre internacia grupeto do. La temoj de la tago estis: Korea literaturo, stilfiguroj, kaj eventuale de ni proponitaj temoj. Mi foriris horon antaŭ la fino, ĉar estas longa vojaĝo de Roterdamo al Groningen, certe kiam oni ŝatas dumvoje ankoraŭ viziti ie parencon.

Tre kore mi salutas vin ĉiujn!


*Wil van Ganswijk-Vlasblom.*

# Preĝo kun interfingrigitaj manoj

Leif NORDENSTORM, SE

*Moseo eliris de Faraono el la urbo kaj etendis siajn manojn al la Eternulo; tiam ĉesiĝis la tondroj kaj la hajlo, kaj pluvo ne plu verŝiĝis sur la teron.* Eliro 9,33.

Multaj svedoj, kaj multaj aliaj Eŭropanoj preĝas kun interfingrigitaj manoj (interplektitaj fingroj). Tamen, se ni serĉas la esprimon "interfingrigi la manojn" en la Biblio, ni ne trovos ĝin. Bibliuloj preĝas kun siaj manoj etenditaj al la Eternulo. Nur kelkcent jarojn post Jesuo, kristanoj komencis interfingrigi aŭ kunigi siajn manojn preĝante. Tial bildoj kun Jesuo kun interfingrigitaj manoj ne estas realismaj, kvankam ili povas esti tre belaj.



Jesuo kun Eŭropa aspekto kun interfingrigitaj manoj.

Estas bone scii kio estas historie korekta kaj kio ne estas korekta. Tio ne signifas ke ni devas ĉesi preĝi kun interfingrigitaj manoj. Ni ne devas imiti Jesuon en ĉiu kampo de la vivo. La eklezio en diversaj landoj rajtas uzi lokajn esprimmanierojn. Tial, por multaj (ne ĉiuj) afrikaj kristanoj, estas natura afero danci dum aŭ post la diservo. Tial, eŭropaj kristanoj, povas preĝi kun interfingrigitaj manoj, kvankam Jesuo tion ne faris. Jesuo tamen instruas al ni ke estas grava afero preĝi, sed li ne atentas kion ni faru per la manoj dum la preĝado.



Kunigitaj manoj

Dio benu vin!



Interfingrigitaj manoj

# 67-a kongreso de KELI

7. – 14. aŭgusto 2017, Z Ö B L I T Z, Germanio

Temo: Fruktoj de la Reformacio

***Se Vi planas partopreni la KELI kongreson neforgesu rapide aliĝi, ĉar la plej avantaĝa tarifo validas nur ĝis la fino de la decembro 2016 !!!!***

La unua listo de partoprenontoj de la kongreso en Zöblitz:

| | |
|---|---|
| 1. Kronenberger Albrecht | Germanio |
| 2. Stamm Sieglinde | Aŭstrio |
| 3. Åradsson, Bengt Olof | Svedio |
| 4. Åradsson, André | Svedio |
| 5. Ráczkevy-Eötvös, Ágnes | Hungario |

***LUTERO***

***Nia tero***
***ne apartenas al ni,***
***ne estas nia propraĵo.***
***Nur luita ĝi estas,***
***nur LUTERO.***

*Albrecht Kronenberger*

# Membriĝo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno
per pago de la kotizo kaj sendo de la adreso al la kasisto

## Kotizoj de KELI 2017

| | |
|---|---|
| Individua membro (kun Dia Regno) | 20,00 EUR |
| Familia membro (sen DR) | 2,00 EUR |
| Subtenanta membro (kun DR) | 30,00 EUR |
| Dumviva membro (20-obla jarkotizo) | 400,00 EUR |
| Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI | 16,00 EUR |
| per libroservo | 18,00 EUR |
| KELI-anoj rajtas aboni ESPERO KATOLIKA pere de la KELI-kasisto | 12,50 EUR |
| IKUE-anoj rajtas aboni DIA REGNO pere de C.O. de IKUE | 10,00 EUR |
| Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj | 3,00 EUR |
| Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj ricevi Dia Regno-n) | Donaco |

La liga gazeto Dia Regno aperas 6-foje jare

Pagmanieroj:

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
2. Poŝtgire al **UEA,** Rotterdam, kaj menciu: por KELI-konto **kelk-p**
   konto-numero en Belgio: 000-163 1831-97
   Germanio, Köln: 3182 91 509, BLZ 370 100 50
   Svedio: 74374-0
   Svislando (Bulle): 12-2310-0
3. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
4. Per ING BANK en NL al **Universala Esperanto-Asocio,** Rotterdam, menciu: por KELI-konto **kelk-p:** BIC: INGBNL2A, IBAN: NL72 INGB 0000 378 564
5. CIC-BANK en Francio por KELI. BIC: CMCIFRPP, IBAN: FR76 1009 6182 45.
6. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto:
   Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Klauzál utca 32, HU 1072 Budapest, Hungario;
   ✆ +36 302 000 306; 💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

# Membriĝo ĉe KELI (kaj la nacia sekcio) per la landa reprezentanto, kiun vi bonvolu kontakti.

Landaj kotizoj:

**Britio**; 15 GBP

Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006 "Fellowship of British Christian Esperantists (FBCE). Kasisto: S-ino Jean Bisset, 47 Airbles Crescent, Motherwell, ML1 3AP; 💻 jean@bisset100.freeserve.co.uk

**Bulgario** *)

Peranto: S-ino Ivanka Kircheva Stoyanova
P.O. Box 701, BG-9000 Varna
✆ + 359 52 639628,
💻 ivanka_esperanto@abv.bg

**Ĉeĥa Respubliko** 300 CZK
kaj
**Slovaka Respubliko** 16 EUR

Peranto: Pavel Polnický,
Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio,
✆ +420 723 672 335,
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Estonio** *)

Peranto: Endel Ojasild, PK. 24,
EE-10502 Tallin,
💻 endel.ojasild@gmail.com

**Finnlando** 30 EUR

Eblas aboni Dia Regnon uzante landan peranton de UEA aŭ laŭ la pagmanieroj menciitaj sur antaŭa paĝo.

**Francio** 25 EUR

CCP n-ro 10 456 15 U Paris,
"Franca Evangelia Esperanto-Ligo (FEEL)". Kasisto: Samuel Gaillard
5 rue Maurice Ravel,
FR-63800 Cournon d'Auvergne
✆ +33 (0)4 73 84 31 31,
💻 samuel.gaillard@ac-clermont.fr

**Germanio** 24 EUR

Evang. Darlehnsgenossenschaft Kiel n-ro 47 00 40, BLZ 210 602 37
"Esperanto-Liga für Christen in Deutschland e.V."
Kasistino: Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde,
✆ 02573 / 626,
💻 hetifisch@googlemail.com

**Hungario** *)

Peranto: Irén Bagi, Baross u. 54/B.II.8, HU 1201 Budapest
✆ 01 283 6566

**Japanio** 20 EUR
(aerpoŝte + 3 EUR)

**Korea Respubliko** 20 EUR
(aerpoŝte + 3 EUR)

**Nederlando** 20 EUR

(por membroj de KUNE +5 EUR)
IBAN: NL49INGB 000 108 75 75
"Chr. Esperanto Verg. KUNE"
Kasistino: Gerda Dercks,
Molenstraat 20, 7607 AL Almelo
✆ +31(0)546 819 403,
💻 gcamdercks@gmail.com

**Pollando** 30 PLN

**Rumanio** *)

Peranto: Maria László, OF1.C.P. 38 Exterior, 4800 Baia-Mare
✆ 062 426182,
💻 laszlo_maria@yahoo.com

**Rusio** *)

Peranto: Larisa Kuzmenko,
Kuŝvinskaja 25 A, 622013 N. Tagil,
Sverdlovskaja Obl. Rusio,
💻 klarisa8@yandex.ru

**Slovaka Respubliko** 16 EUR

Vidu ĉe Ĉeĥa Respubliko

**Svedio** 250 SEK

Poŝtĝirkonto n-ro 9 14 39-0
"Kristliga Esperantoförbundet"
Kasisto: Bengt Olof Åradsson,
Nygatan 10 A, lgh 1102;
S-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 (70) 2004574;
💻 dr_boarad@yahoo.se

**Svislando** 20 EUR

Pagu al la svislanda UEA-konto (vidu antaŭan paĝon, punkto 2)


**Usono** 30 USD

Oni sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton al la peranto: Jerald T. Veit, 3578 S. Taylor, Milwaukee, WI 53207
💻 jeraldveit@yahoo.com

*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto

# Informetoj

## Giganta laboro estas (preskaŭ) finita!




617 piano-aranĝoj estas videblaj kaj aŭskulteblaj sub:
fontoj.net > Adoru > … ADORU: Aranĝoj por piano (Ernst Leuze)

Grandan dankon al Ernst, nia eklezia muzikdirektoro, kaj al Albert Urban, nia komputilisto!

Kaj nun, muzikistoj, muzikantoj, pianistoj aŭ piano-ludantoj, uzu la eblecon! Ludu, kiom la koro deziras!

Salutas vin
Albrecht

---




## Kirchentag en Berlino 2017

Laŭ informo surrete la Germana sekcio de la "Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI)" intencas partopreni en la "Kirchentag 2017" per informbudo pri Esperanto.

Helpantoj estas bonvenaj. La evento okazos inter 24. - 28. majo 2017.

Informoj pri la evento estas (germane aŭ angle) legeblaj en kirchentag.de





La bildoj montras la eventon en 2015

Ĉerpita de https://esperanto.berlin/?s=kirchentag

# Arne Lundkvist

14. majo 1919 – 18. novembro 2016



Arne Lundkvist dum la kongreso en Pribylina en 2008. /Fotis V. Pospišil

La 18-an de novembro Arne estis survoje butikumi kiam li laciĝis, sidiĝis por iom ripozi, kaj neatendite mortis.

Arne naskiĝis en Stokholmo. Li havis pli aĝan fratinon. Li lernis ĝis la matura ekzameno en Stokholmo kaj poste militservis, inter alie dum la dua mondmilito. Pro la militservo kaj postaj oficoj li loĝis kaj deĵoris plurloke en Svedio ĝis li finfine setlis por kelkaj jaroj en Malmö. Dum la kvardekaj jaroj li tie lernis Esperanton kaj aliĝis al UK en Malmö 1948. Pro prelego de Anna Alamo (poste Sandgren), li eksciis, ke antaŭ UK okazos la unua KELI-kongreso en Tostarp (en la sama regiono kiel Malmö) kaj li helpis trovi loĝlokojn por nederlandanaj kongresanoj ĉe svedaj familioj. Dum tiu kongreso en Tostarp Arne ekkonis Mijntje, kun kiu Arne edziĝis en 1951 en Rotterdamo. Post la geedziĝo ili loĝis en Karlskrona antaŭ ol ili transloĝiĝis al Stokholmo, kie Arne laboris kiel bankoficisto ĝis sia pensiuliĝo. En 1988 Mijntje mortis. Ĉirkaŭ dek jarojn poste Arne transloĝiĝis al Smolando.

Dum la jaroj ili multe vojaĝis kaj inter alie partoprenis diversajn KELI-kongresojn. Post la morto de la edzino, Arne daŭre multe vojaĝis kaj havis multajn gekonatulojn en pluraj landoj. La lasta KELI-kongreso, kiun Arne partoprenis, estis en 2008 en Pribylina. Arne postlasas filon kaj du genepojn. — Arne, ripozu en paco!

*Bengt Olof Åradsson*

---

# Endre Dudich



Dum la kongreso en Piliscsaba

27. januaro 1934 – 3. novembro 2016

Endre Dudich estis hungara esperantisto. Profesie li estis geologo, geokemiisto, sciencisto. Endre scipovis plurajn lingvojn, entute li okupiĝis pri 28 lingvojn. En pluraj li verkis kaj prelegis. Multaj estas liaj artikoloj en diversaj gazetoj. Plurfoje li verkis ankaŭ por Dia Regno kaj partoprenis kaj prelegis en la ekumena kongreso en Piliscsaba 2005. Ripozu en paco!

*Bengt Olof Åradsson*

# Venu, Jesu', ni atendas vin

(originale verkita en Esperanto)




VENU, JESU', NI ATENDAS VIN • M kaj E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2016-10-14